

Christian Winther,  
Sun' estingiĝis

*tradukita de Hans Erik Jensen*

Sun' estingiĝis, tag' denove mortis,  
Nuboj leviĝis, nokton al ni portis,  
steloj ridetas milde sur ĉielo  
tra la malhelo.

Ho, kiam venos al mi la tagfino,  
do mi ĝin benos pie per kapklino.  
Fine mi dormos pace kiel floro  
ĝis la aŭroro!

*Traduko de la Dana poemo "Hvile" de CHRISTIAN WINTHER (Kristiano Vintero, \*1796 – †1876) en Esperanton de HANS ERIK JENSEN (†1973-06-18).*

*Arg-244-923 (2008-09-14 00:00:04)*

*La kanto-teksto estas libere tradukita de la dana esperantisto Hans Erik Jensen. La traduko troviĝas en la kant-libreto "Kantu", eldonita de H. E Jensen kaj Harald Grønberg, sur la paĝo 18, kanto n-ro 17. Ĝi estas kantebla laŭ melodio de Hakon Andersen (laŭ indiko notita super la teksto en la kantlibreto.) Pri Hans Erik Jensen vidu ankaŭ la retejon: <http://www.esperantonia.dk/bio-hej.htm>.*